# *Kubo: ekonomiaj transformoj kun integrala fokuso*



**Meisi Bolaños, ministrino  de Financoj kaj Prezoj.**

Havano, jan 16 (RHK) Meisi Bolaños Weiss, ministrino de financoj kaj prezoj, agnoskis la rolon de la kuba lo?antaro en la korekta starigo de la politiko de prezoj aprobitaj kiel parto de la procezo de mona ordigo.

En la unuaj 13 tagoj de tiu ?i procezo, koncerne al komunika agado de tiu ?i organismo, okazis ?irka? 500 kontaktoj kaj 78 denuncoj rektaj, informis la ministrino en la radiotelevida spaco Mesa Redonda.

?i precizigis ke la lando travivas transformon okaze de la mona kaj financa ordigo, kaj oni ne povas vidi ?in apartigita de la regula?oj aprobitaj de la registaro en 2020 kiel parto de ekonomia kaj socia strategio kaj batalo kontra? la Covid-19.

La prezo-transformo estas provokita de la mona devaluto fronte al la dolaro (23 fojoj), kio igas la importa?ojn pli kostaj, aldonis Meisi Bolaños.

?i elstarigis ke oni eliminas subvenciojn kaj troajn senpagecojn, sen rezigni je la konkeroj de la Revolucio, kaj efektivi?as procezo de prezo-interrilati?o, nome inter pograndaj kaj pomalgrandaj prezoj.

Kiel anta?a?oj la ministrino memorigis ke en 1978 oni aprobis la dekreton 28, kiu preskribis ?eneralan reformon de prezoj surbaze de analizoj faritaj en la I-a kongreso de la komunista partio. ?i efektivi?is tri jarojn poste.

Kaj en 1994, meze de la nomata Speciala Periodo, por impulsi la ekonomion kaj sanigi la internajn financojn, oni aprobis novajn prezojn por atingi financajn ekvilibrojn. Kelkaj el tiuj prezoj restis validaj ?is la jaro 2020.

Nun okazas granda transfomo ?i-rilate, sed kune kun aliaj politikoj, kiuj donas al ?i pli integralan fokuson, ?ar inkluzivas fiskajn kaj financajn transformojn.

?i emfazis ke bona parto de la produktoj kaj servoj pograndaj havas kosto-kreskon pro la sekvoj de la mona ordigo, tamen, oni reguligis ilin por ke tiuj kreskoj ne transiru al la pomalgrandaj valoroj en la unua momento. Oni metis limojn por ke la kresko ne estu pli ol la desegnita.

Kreskas prezoj, kostoj kaj elspezoj ligitaj, sed oni devas ?in apliki korekte kaj transformi la manieron labori por ke estu pli da efikeco kaj produktiveco, asertis la ministrino.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/244797-kubo-ekonomiaj-transformoj-kun-integrala-fokuso

**Radio Habana Cuba**